


Hermann Göhl †



En sia 72a jaro de penoriĉa vivo mortis la 11an de Januaro 1931 en Neugersdorf Prof. Dro Hermann Göhl.

Kiam ankoraŭ necesis la kurago de sentima kaj forta viro, por publike sin deklari por E, la mortinto, partopreninte E-kurson dum aŭtuno 1908, ekprenis la prezidantecon de la E-ista Grupo Riesa okaze de la fondiĝo la 24an de Novembro 1908.

De post tiu tempo li dediĉis preskaŭ sian tutan liberan tempon al la E-a movado. Liaj ampleksaj filologiaj scioj kaj lia nelacigebla diligenteco, kiu ne haltis antaŭ subtilaj penigaj laboroj, ebligis al li, baldaŭ ekposedi imponan pozicion en la E-movado. Lia modesta konduto havigis al li ĉie amikojn; malamikojn li tute ne havis.

Diversaj kaj multaj honoradoj de nacia kaj internaciaj organizoj faris lin nur pli modesta kaj pli laborema por E, de li amata kaj ĉie malkaŝe konfesata. Kion ni perdis en li, ni ne jam povas tute pririgardi.

Funerbrantaj ni staras ĉe la tombo de vere ideala pioniro de nia komuna idealo.

Gustav Hermann Göhl naskiĝis la 17an de Junio 1859 en Mitteloderwitz (Saksujo) kaj devenis el modestaj rondoj. Studinte teologion, germanistikon kaj modernajn lingvojn, li doktoriĝis kaj servis kiel lernejestro en diversaj saksaj lokoj, laste en Riesa de 1901 ĝis 1919. Tie li evoluigis kaj estris de post 1902 la realgimnazion, kiu transformiĝis en reallernejon kaj post lia eksliĝo en superan reallernejon.

La poresperanta laboro de Prof. Göhl komenciĝis en 1908. Ĝis lia foriro je Pasko 1919 li ne nur estris la grupon en Riesa, sed ankaŭ gvidis multajn kursojn (interalie en sia lernejo) kaj laboris kiel verkisto. La E-ista Grupo Riesa honoris sin kaj lin, deklarante lin honormembro la 26an de Junio 1927 kaj Honora Prezidanto la 9an de Decembro 1928.

La eksliĝo en Riesa kaj transloĝiĝo al Neugersdorf tute ne sekvigis ripozadon, sed la nunmortinto sin dediĉis pli multe al sia E-laboro. Li vigligis la grupon en Neugersdorf kiel prezidanto kaj fariĝis tie la centro de la tuta E-movado en la sudorienta Saksujo. De post 1921 ĝis 1930 li estris la gramatikajn ekzercojn kaj premiôtaskojn en Germana Esperantisto. Rezigninte je tiu laboro pro sia sanstato, li estis honorata de Germana Esperanto-Asocio okaze de la Dresden-a Kongreso: li fariĝis Honora Membro de G. E. A. la 10an de Junio 1930.

La multa laboro, aludita supre, ne detenis lin, akcepti en la jaro 1922 la prezidantecon de Germana Akademia E-Ligo, kiun li gvidis ĝis post la inflacia tempo, t. e. ĝis 1926.

Ankaŭ Universala E-Asocio perdis en li fidelan membron kaj multjaran delegiton. Akirite en 1912, li servis kiel delegito ĝis sia morto, ĝis 1919 en Riesa, kaj de tiam en Neugersdorf.

De post 1922 ĝis sia morto li estis prezidanto de la Ekzamen-Komisiono por Sächsische Lausitz, laborante kiel ekzamenkomisaro en la nomo de la E-Instituto por la Germana Respubliko.

Lingva Komitato elektis lin la 1an de Majo 1929 sia membro.

Se ni fine aldonas, ke la mortinto verkis valoran germanlingvan propagandlibron „Esperanto“, la duan eldonon de la Demandaro de Ladevéze, ke li verkis la lernolibrojn „Esperanto-Lehrbuch für Volksschüler“ kaj „Esperanto durch Sprechen“, ke li kunlaboris en „Germana Esperantisto“, „Esperanto-Praktiko“ kaj „Esperanta Junularo“, ni nur citas la ĉefajn literaturajn laborojn. Unu verko estas ankoraŭ notenda: post okjara, seninterrompa laboro li verkis „Ausführliche Grammatik des Esperanto“; malmultajn tagojn antaŭ sia morto li sendis la lastajn foliojn de la manuskripto al la eldonisto.

Nun ripozas lia nelacigebla plumo! Neniam ni forgesos lin!

E-ista Grupo Riesa E-Grupo Neugersdorf
Dro Döhler R. Pfützner

Germana Akademia E-Ligo
Dro Steche

E-Instituto por la Germana Respubliko
Dro Dietterle

Universala E-Asocio Lingva Komitato
Stettler Dro Cart

Germana Esperanto-Asocio (R. S.)
Behrendt